

Gazeto Andalusia



ANDALUZIO PER SI, POR HISPANIO KAJ LA HOMARO

N-ro 26 ★ 7-a Jarkolekto ★ JANUARO - DECEMBRO 1990



1891

1990

RAFAEL FIOL PAREDES

LA PLEJ EMINENTA ANDALUZIA ESPERANTISTO

GAZETO ANDALUZIA

FUNDADA POR D. JOSE GARZON RUIZ en San Fernando (Cádiz) 1910.
Organo Oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.

EDITA: ASOCIACION ANDALUZA DE ESPERANTO. REDACCION: C/ SOL 75 41003 SEVILLA
DIRECCION POSTAL: Apartado 12.209. 41080 SEVILLA. DEPOSITO LEGAL: MA-1136/86
IMPRIME: COPYUR, Cuesta del Rosario 14 SEVILLA
DIRECTOR: José María RODRIGUEZ HERNANDEZ.

DIRECCIONES DE INTERES

Asociación Andaluza de Esperanto
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
C/ Sol 75 41003 SEVILLA

Asociación Andaluza de Esperanto
Apartado 12.209. 41080 SEVILLA

Grupo de Esperanto de MALAGA
Apartado de Correos 3275
29080 MALAGA

Asociación SEVILLANA de Esperanto
C/ Sol 75 41003 SEVILLA

Asociación CORDOBESA de Esperanto
Apartado 611 14080 CORDOBA

Grupo Esperantista de JEREZ
Apartado 320 JEREZ (Cádiz)

Grupo Esperantista de TORROX
Apartado 13 TORROX (Málaga)

Grupo Baha'i de Amistad Esperantista
Apartado de Correos 496
11200 ALGECIRAS (Cádiz)

Asociación Sevillana de Jóvenes
Esperantistas
C/ Sol 75
41003 SEVILLA

Sección Andaluza de Jóvenes
Esperantistas
Apartado de Correos 611
14080 CORDOBA

Curso de Esperanto por Correspondencia
Apartado de Correos 864
29080 MALAGA

ENHAVO

	PAGO
★ CEFARTIKOLO	1
★ INTERESA INFORMO	2
★ PACON!	3
★ AGADO DE AEU DUM 1990 .	4
★ DECIDOJ 7a KONGRESO ...	6
★ ANONCOJ	7
★ SIMBOLIKO DE SAKOJ	8
★ EKSP0'92 KAJ LA LINGVO	
★ DE SIAJ ELDONAJOJ	10
★ LA SENCO DE LA E-KONGRE-	
★ SOJ EN ANDALUZIO	11
★ KURIOZAJ0	12
★ E=mc2 * SCIENCA PAGO ..	13
★ HUMORO	14
★ MOROMURCIO DE HONOR ...	14
★ NUN NI * JUNULARA PAGO.	15
★ KRUCVORTENIGNO	16

★ SUR LA KOVRIL0: Speciala me-
★ morajo por nia forpasinta sa-
★ mideano RAFAEL FIOL PAREDES.

★ SUR LA KONTRAKOVRIL0: Pago
★ 4-a de la Esperant-lingva at-
★ laso de Andaluzio dediĉata
★ al la vilaĝoj de la Provinco
★ Almerio.

DEPOSITO LEGAL MA-1.136/86

ĈEFARTIKOLO

Mi vizitis la hejmon de S-ro RAFAEL FIOL PAREDES tri fojoj; antaŭ ol koni lin persone seviljaj samideanoj parolis min pri li kaj pri lia giganta memoro, li povus paroli pri ĉio okazita rilate la Esperanto-Movadon en Andaluzio dum la unuaj jardekoj de nia jarcento. Mi konis sian fotografaĵon ĉar mi tralegis kelkajn revuojn de la 10-a jardeko kie li aperis vestita en sia milit-uniformo reprezentante la esperantistaron de Nord-Afriko dum la unuaj andaluziaj kongresoj.

Kiam mi vidis lin unuafoje tio kio min unue surprizigis estis sia forto, malgraŭ sia naŭdekeljaraĝo li atendis nin en la pordo de sia vilao, li akompanis nin tra la tuta domo suprenirante dekon da ŝtuparoj kaj li prenis pezajn librojn, ŝajnis ke parolante pri Esperanto nenio povus fatigi lin, kvankam li estis iom malforta ĉar li ĵus trapasis malsanon, avertis nin familianino. RAFAEL FIOL parolis nin pri la antikva esperantistaro de Seviljo, pri siaj kunvenoj, organizoj, festoj, parolis ankaŭ pri la unuaj andaluziaj kongresoj, pri vizitoj de eksterlandanoj, pri la problemoj de la esperantistaro dum la unua mondmilito. Antaŭ ol tiu momento Esperanto estis por mi bela lingvo disvastiginda, sed kiam mi adiaŭis lin mi komprenis ke ĉirkaŭ nia lingvo estas nekredbla aro da personoj kiu formas nian Historion kaj ke R. FIOL estis la plej grava histori-kolektanto de nia Movado. Post tiu unua vizito, kiam mi revenis al Kordovo, mi senĉese traserĉis librojn kaj ĵurnalojn en arĥivoj kaj bibliotekoj studante plezure la okazintaĵojn pri kiu mi parolis R. FIOL.

Loĝante jam en Seviljo mi vizitis lin duafoje, tiam mi jam konis serioze multajn aspektojn de la Historio de la Andaluzia Esperanto-Movado, kaj mia intenco estis havi pli certajn informojn de rekta koninformo. Tiu dua vizito ankaŭ estis ne-forgesebla, li montris al ni dekonojn da fotografaĵoj, li memoris ĉiujn personojn en la tutaj bildoj, tiun ĉekoslovakon kiu persekutata en sia lando ĝuis la gastemon en Seviljo de R. FIOL dum kelkaj monatoj, pri la agado de Trinidad Soriano kiam li helpis la andaluziajn partoprenintojn en la fiaska Pariza Kongreso de Esperanto kiam komenciĝis la unua mondmilito; kaj ankaŭ rakontaĵoj pri ne-esperantistaj aferoj, kiel tiu sefarado en Nord-Afriko kiu unuafoje en sia vivo parolis la hispanan kun eksterfamiliano, aŭ pri la milito en Maroko kaj kiel li mirakle savis sian vivon.

Antaŭ kelkaj semajnoj mi vizitis la hejmon de R. FIOL triafoje. li forpasis en Februaro, sed siaj miloj da libroj pri ĉiaj temoj ankoraŭ estis tie. Sia filino AMPARO FIOL montris al ni sian tutan hejmon, la ĉeesto de RAFAEL FIOL en siaj libroj, fotografaĵoj, broŝuroj kaj tekoj estis okulfrapa. La memoro pri li ĉeestis dum nia tuta babilado, tiel mi konis la grandecon de sia konemo, miloj da libroj, broŝuroj kaj memoraĵoj plenokupis la grandan vilaon, eĉ en la teraso mem estis necese

konstrui ĉambreton por gardi pliajn librojn, pliajn ĵurnalojn. RAFAEL FIOL mortis en Februaro, li diris iufoje ke ŝajnis ke Dio forgesis lin. Sia longa vivo estis utila por koni, sia intenco havi konojn pri ĉio portis lin enhavi mult-aspektajn materialojn. Li dediĉis sian vivon al la studo, eĉ dum la lastaj tagoj de sia vivo li substrekis la plej gravajn novaĵojn en la E-ĵurnaloj.

AMPARO FIOL, sia filino, havas la malfacilan taskon ordigi la tutan materialon, ŝi promesis al ni donaci la Esperanto-Materialon, antaŭ kelkaj semajnoj li donis al ni la unuan parton. La Andaluzia Esperanto-Movado kompromisiĝis krei per ĉi heredaĵo specialan bibliotekon pri la Movado en Andaluzio dum sia unua epoko. Ankaŭ ni devos ordigi la materialon laŭ jaroj kaj temoj, tio daŭriĝos multaj tagoj de agrabla laboro, verŝajne per tiu dediĉo ni lernos iom pli pri RAFAEL FIOL, ni certe eltrovos novajn rakontaĵojn en siaj libroj kaj en siaj tekoj kaj ni konstatos ke li, viva nun en siaj libroj, estas la plej elstara samideano de Andaluzio.

J. M. R. H.

★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★

NOTA DE INTERES

La Asociación Andaluza de Esperanto está muy interesada en contactar con alguien que haya traducido la obra de Juan Ramón JIMENEZ "Platero y Yo", con vistas a una posible edición en la lengua internacional. Desearíamos contactar también con quienes hayan empezado a traducirla o tienen proyectado hacerlo.

Nuestra dirección: Asociación Andaluza de Esperanto
Apartado de Correos 611
E-14080 CORDOBA (España)

INTERESA INFORMO

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo deziregus kontakti kun iu tradukanto en esperanton de la verko de Juan Ramón JIMENEZ "Platero y Yo", ĉar ni celas eldoni ĝin esperant-lingve. Ni ankaŭ deziras kontakti kun tiuj kiuj ektradukis ĝin aŭ pruvis fari tion.

Nia adreso: Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Poŝtkesto 611
E-14080 CORDOBA (Hispanio)

★ ★

Kiam ŝajnis ke finfine la PACO regus sur la mondo, kiam oni ekparolis pri la forigo de la du grandaj militaj organizoj, kiam la televido montris nin ke la forto de la popoloj ne povas esti haltigata de politikistoj; ni, ŝajne, ekvidis ke la mondo ankaŭ povus esti minacata for Eŭropo, ke la diferencoj riĉeco-povreco estas abismaj en Afriko, Azio kaj Ameriko, ke la monda PACO ankaŭ povas esti minacata de loka milito. Sankta Dio, Ĉiopova Allah! Ĉu ni denove luktos en alia milito? Ĉu ni denove parolos pri dekoj aŭ centoj da miloj da mortintoj? Ĉu ni denove aŭdacos uzi nukleajn armilojn aŭ ĵeti malsanajn virusojn super aliajn homojn?

Ve! Ni lernis nenion. Ni, kiel simplaj civitanoj, pensis ke la PACO naskiĝus en la internaciaj renkontiĝoj aŭ en la politikaj intervjuoj; sed male, kiel klarigas la Ĉarto de UNESKO, la milito ne naskiĝas en la bataalkampoj sed en la mensoj de la homoj, kaj devas esti tie kie devas naskiĝi la PACO. Ĉu ni militos denove aŭ ne? Kiom da personoj mortos? Ĉu ni denove uzos nukleajn aŭ ĉemiajn armilojn? Ĉu ni mem suferos la militon? Ni estas tiel egoistoj, ke ni ankoraŭ kalkulas la eblan prezon de la benzino post la milito.

Tamen, ni estu kuraĝaj, parolu ni jam pri la forigado de la landlimoj, pri la fino de naciaj suverenecoj kiuj multfoje utilas nur por leĝigi la ne-respektadon de la homaj rajtoj far aĉaj diktadoroj, ni forgesu la landlimon Nordo-Sudo parolante pri riĉeco-povreco kaj laboru ni arde por disvolvi harmonie la riĉecon en la tuta mondo, kaj ne nur en la nia. Ni forgesu la standardojn, la himnojn, la naciajn orgojlojn, la suverenecon sur unu-plia insulo aŭ teritorio. La PACO ne havas landlimojn, nek ĝi mezuriĝas per kvadrataj kilometroj. La PACO komenciĝas en la menso de la homoj kaj ĝi devas esti prezenta en ĉiuj aspektoj de iliaj vivoj.

Bonvolu Sadam Hussein, George Buŝ, Miĥail Gorbaĉov, Reĝo Hussein, Jasir Arafat, Izaak Samir kaj ĉiuj estroj de la mondo, je la nomo de la Homaro, kaj je la nomo de tiuj homoj kiuj de antaŭ 100 jaroj eltrovis ke ni ne estas francaj aŭ britoj, irakanoj aŭ usonanoj, palestinoj aŭ israeloj, sed homoj kun homoj, ni petas:

PACON!

... bonvolu.

RAPORTO PRI LA AGADO DE AEU * OKT'89 / OKT'90

Okaze de la pasinta Ĝenerala Asembleo de la Andaluzia Esperanto-Unuiĝo la Estraro prezentis raporton pri la agado de nia asocio dum la periodo Oktobro '89 / Oktobro '90. Ni provos prezenti resumon de tiu raporto kune kun la financa bilanco de nia asocio dum ĉi tiu periodo.

* ADMINISTRADO: La administrada teamo daŭrigis la kunordigadon de la diversaj Esperanto-grupoj en Andaluzio. Oni starigis telefonan servon por ĉiuj kiuj interesiĝas pri Esperanto kaj same por tiuj geesperantistoj kiuj volis koni ion konkreta pri la movado. Ĉi servo respondis dum 4 monatoj pli ol 50 telefon-alvokojn, inter ili kelkaj de publikaj instancoj.

* PUBLIKAĴOJ: Ĉi ĉapitro ne estis tre pozitiva dum 1990. Nur aperis unu numero de la revuo GAZETO ANDALUZIA dum ĉi periodo. Ankaŭ kelkaj problemoj malebligis la publikadon de MONATE ĈE VI de Marto ĝis Septembro. Tamen pri ĉi lasta revueto estas necese diri ke fine de Septembro normaligis la aperado eĉ kun pli diversa kaj interesa enhavo.

* DISKO: Nia malaga samideano Eduardo Vargas "SOLO" eldonis kun la financa helpo de AEU longdaŭran diskon kun siaj kanzonoj en esperanto. La eldonado kaj produktado de ĉi tiu disko estas ege altkvalita. Ankaŭ oni ekigis kampanjon por diskonigi la diskon kaj faciligi la aĉetadon. La eldonado estis ebla dank'al la ekonomia helpo de membro de nia asocio kiun ni repagos kun la vendado de la disko.

* SUBVENCIOJ: Ni atingis 40.000 Ptojn donacitaj de la Provinca Sparkaso de Malago. Same unu el niaj asociaj grupoj, SEJO, ricevis 50.000 Ptojn de la Junulara Departamento de la Andaluzia Registaro.

* KURSOJ: Okazis elementaj kursoj de esperanto en Seviljo kaj en Malago. Oni daŭrigis la perkorespondan kurson. Bedaŭrinde la intensiva perfektiga kurso planita por Somero'90 ne povis okazi pro manko da mono.

* UNUSEMAJNA ELEMENTA KURSO: Grandega sukceso estis la organizado de unusemajna elementa kurso en Torokso. Ĉeestis 15 personoj kiuj rapide kaj tre kontentige regis la lingvon en unu semajno. Ĉi kurso estis organizata de la malaga grupo kaj la profesoro estis Alberto Franco.

* EKSPO'92: La organizantoj de la Universala Ekspozicio Seviljo-1992 fine ne akceptis nian proponon eldoni esperant-lingvan broŝuron pri la Ekspo. Aperis en la revuo ESPERANTO anonceto de funkciulo de la Ekspo'92 por informi ĉiujn eblajn interesitojn pri ĉi evento. Oni komencigis la kontaktojn AEU-UEA-UNESKO por organizi E-standon ĉe la paviljono de UNESKO dum la Universala Ekspozicio.

* TURISMO: Oni subskribis akordon inter AEU kaj la internacia organizo MONDA TURISMO, per ĉi kontrakto la andaluzia asocio estas ekde nun la reprezentanto en Hispanio de tiu asocio. Same oni sendos kelkajn esperanto-ekskursojn kiuj vizitos Andaluzion, tiuj ekskursoj, kune kun la loĝado estos organizata de AEU. Dank'al ĉi akordo dum 1990 estis du la polaj ekskursoj kiuj vizitis Andaluzion kaj Marokon, entute preskaŭ 50 personoj.

* INTERNACIA AMIKECA RENKONTIĜO: Dum Oktobro 90 oni organizis turisman renkontiĝon en Torokso por tiuj samideanoj kiuj dum unu semajno deziris resti trankvile apud la plaĝo en tiu bela malaga vilaĝo konante samtempe la malagan aksarkion. La renkontiĝo estis granda sukceso, ĉeestis 25 personoj kiuj ĝuis amikeman etoson.

La Sekretario de AEU.

FINANCA RAPORTO DE AEU

La ekonomia bilanco de nia asocio dum la periodo Oktobro'89 / Oktobro '90 prezentas jenan staton:

ENSPEZOJ

Favora Saldo je 12-10-89	102.334 R
Membro-kotizoj	23.000 "
Donaco de la Provinca Sparkaso de Malago ..	40.000 "
Donaco ricevita por publikaĵoj	30.000 "
7 ^a Andaluzia Kongreso de Esperanto	138.100 "
Vendado de Kristnaska Nacia Lotado	24.000 "
Pruntedono por la eldonado de disko	100.000 "
Vendado de la disko	50.000 "
Perkoresponda Kurso	50.000 "
Unusemajna Kurso Torokso Februaro '90	60.000 "
Turisma vizito de Esperantotur	15.000 "

ENTUTE: 632.434 R

ELSPEZOJ

Administrado	2.050 R
Pago de pruntedono por la koresp. kurso ..	50.000 "
Aĉeto de Kristnaska Nacia Lotado	20.000 "
Eldonado de disko	200.000 "
Perkoresponda Kurso	3.800 "
Eldonado de GAZETO ANDALUZIA	27.500 "
Organizado de la 7a Andaluzia Kongr. E-o .	143.091 "
Eldonado de MONATE ĈE VI	22.427 "
Organizado de la Kurso Torokso Febr. '90 .	60.000 "
Elspezoj de la turismaj vizitoj	15.000 "

ENTUTE: 543.868 R

Favora Saldo je 12-10-90

88.566 R

632.434 R

La Ĝenerala Asembleo de la Andaluzia Esperanto-Unuiĝo renkontiĝis la pasintan monaton Oktobron okaze de la 7a Kongreso de Esperanto, jen resume de la plej gravaj decidoj.

* ADMINISTRADO: Pasis jam du jaroj post la elekto de la nuna estraro kaj pro tio estis necese nomumi novan kiu ekde Oktobro '90 estas ĉi tiu:

Prezidanto: Andrés MARTIN GONZALEZ
Vic-Prezidanto: Alberto FRANCO RAMIREZ
Ĝenerala Sekretario: José Fco. MARTIN DEL POZO
Kasisto: Vicente RAMIREZ PARRAGA

Ĉi nova estraro postenos ĝis Oktobro '92. La Ĝenerala Asembleo dankis la agadon de la ĵus anstataŭigita estraro. Oni aprobis novan kotizon por 1991 kiu ekde nun estos 1.200 ptoj jare kiel baza kotizo. Same ene de la administrada ĉapitro oni decidis aktualigi la liston da membroj kaj efikigi la pagon de la kotizoj.

* PUBLIKAĴOJ: AEU daŭrigos la eldonadon de GAZETO ANDALUZIA kiu devos aperi en 1991 kvarfoje, plibonigante, se eble, la enhavon kaj kvaliton, kvankam ambaŭ aferoj estas sufiĉe kontentigaj. Pri MONATE CE VI aperos inter 6 kaj 12-foje dum 1991, ĝi devos aperi la saman kvaliton kaj enhavon de la du lastaj numeroj 61 kaj 62. Oni nomumis respondeculon de ambaŭ publikaĵoj al José María Rodríguez Hernández.

* TURISMO: Oni decidis oficialigi kiel fakan sekcion de AEU la turisma branĉo ĝis nun ekfunkcianta. Ĝi devos daŭrigi la kontaktojn inter AEU kaj MONDA TURISMO, oni bonvenigos kiel eble plej nombrajn turismajn grupojn, organizante ekskursojn al diversaj andaluziaj grupoj kaj al nordo de Maroko. Oni nomumis respondeculojn de ĉi sekcio al Julio Herrero Segura kaj al Antonio González Alvarez.

* KURSOJ: Oni daŭrigos la ekziston de la perkoresponda kurso, pliigante la propagandon. Se la malagaj respondeculoj havas sufiĉan tempon kaj rimedojn oni organizos denove unusemajnan elementan kurson en Februaro '91 en Torokso. Same oni organizos perfektigan kurson en Seviljo en Somero.

* KOMUNIK' ESPERANTO: Ĉi franca ideo baziĝas je la publikigado de gvidlibro por tiuj entreprenoj kaj profesiuloj kiuj kapablas oferi siajn servojn en esperanto. AEU apogas ĉi ideon kaj propagandos ĝin pere de artikoloj en GAZETO ANDALUZIA.

* EKSPO '92: Oni daŭrigos la kontakatojn kun UNESKO por organizi Esperanto-standon ĉe la paviljono de ĉi internacia organizo dum la Universala Ekspozicio de Seviljo en 1992.

* RENKONTIGO: La proksima Andaluzia Kongreso de Esperanto estos oficiale la 9-a Andaluzia Renkontiĝo de Geesperantistoj, tie okazos la Generala Asembleo de nia asocio. Ĝi okazos en Torokso (Malago) de la 11-a ĝis la 13-a de Oktobro de 1991. Se tio estus ebla oni organizos kelkan kunvenon, ekspozicion aŭ prelegon en aliaj datoj por propagandi Esperanton.

* DANKEMO: Fine oni dankis al la organizantoj de ĉi kongreso, speciale al Antonio GONZALEZ ALVAREZ, Julio HERRERO SEGURA kaj Paqui CORRALES GUERRERO, pro ilia konstanta entuziasmo kaj sindonemo en la gastigado de ĉiuj vizitantoj kaj partoprenantoj en ĉi kongreso.

⊕ ⊕ ⊕ ⊕ ⊕ ⊕ ⊕ ⊕ ⊕ ⊕ ⊕ ⊕ ⊕ ⊕ ⊕

CURSO ELEMENTAL DE ESPERANTO POR CORRESPONDENCIA
Apartado de Correos 864. 29080 MALAGA

ANONCO

Se comunica a todas aquellas personas interesadas en hacer aparecer anuncios en las páginas de esta revista que *GAZETO ANDALUZIA* es una publicación abierta a todos aquellos que deseen utilizarla para la difusión de sus productos, servicios o actividades. Para ello damos a conocer el siguiente índice de tarifas:

- 1 página 2.000 ₧
- ½ página 1.000 "
- ¼ página 500 "

Por la aparición de 3 anuncios en números seguidos sólo se pagan 2

PAGO DE CUOTAS

Recordamos a todos nuestros asociados que aún no hayan satisfecho la cuota correspondiente al año 1990 que ésta podrá pagarse ingresando la cantidad de 1.000 Pta en la cuenta corriente de la Caja Postal nº 013.837.197 a nombre de la Asociación Andaluza de Esperanto.

Asimismo recordamos a todos los que deseen ya pagar la correspondiente a 1991 que deberán ingresar en la misma cuenta 1.200 Pta, cantidad mínima, si alguien puede y desea pagar una cantidad superior le quedaremos muy agradecido.

Para el pago de las cuotas la AEU ha editado un impreso para aquellos socios que deseen pagar por medio de domiciliación bancaria.

¡COLABORA CON NOSOTROS, DIFUNDIR EL ESPERANTO EN ANDALUCIA ES TAREA DE TODOS!

SIMBOLIKO DE SAKOJ

Laŭ Plena Ilustrita Vortaro, ŝa-ko estas "Ludo, kiu devenas el Hindujo kaj konsistas el 32 diver- saspecaj figuretoj, kiujn oni mo- vas sur tabulo prezentata 64 ega- lajn kvadratojn, alterne nigrajn kaj blankajn". Nu, tiu priskribo taŭgas por identigi la ludon kaj resendas al nacilingvaj tradukoj.


Tamen la leganto eble deziras konatiĝi intime kaj praktiki, kaj do li devus aliri fakan verkon aŭ enciklopedion. Tie li legos pri ŝakoj kaj damoj, reĝoj, kurieroj, ĉevaloj, turoj kaj peonoj; tie li arokos, ŝakiĝos kaj matos. Aŭ eble liaj pecoj metiĝos en eter- nan ŝakiĝon sur la fakoj de la ta- bulo aŭ la tapiŝo, ĝis lia kontra- ŭulo estos trafita.

Sed povas okazi ankaŭ, ke oni laciĝis de suprajeco kaj deziras ekscii pri la profunda signifo de la pecoj kaj reguloj, de la esen- co mem de la "ludo" kaj ĝia scena- jo. Tiucele jen traduko klariga, informrica, el la libro "La Civi- lización Hispano-Árabe", de la fa- ma germana reserĉisto Titus BURCK- HARDT (paĝoj 141-143).

"La termino "jaque mate" (=mato) devenas de la araba aš-ŝah māt kaj signifas "la reĝo mortis". Ŝah estas lingva pruntaĵo el la persa kaj signifas "reĝo". Laŭ tio, la ŝakludo kiun la araboj ricevis de la persoj kaj transdonis al la kristana Eŭropo, estas la "reĝa ludo"; tamen ne nur ĉar oni ludas por la reĝo-peco, sed ĉar en sia tuta konceptiteco ĝi estas para-

bolo de -tiel nomebla- reĝa ar- to; matematika parabolo, en kiu manifestiĝas la interna rilato inter libere elektita ago kaj la neevitebla destino.

La ŝaktabulo reprezentas la mondon. Ĝi havas hindan devenon kaj respondas al mandalo, sim- pligita reprezento de la kosmaj cikloj, kiujn ni retrovas, bil- digitaj en geometria skemo, en la ŝaktabulo. La kvar centraj fakoj reprezentas la kvar bazajn fakojn de ĉiuj cikloj, la epo- koj kiel la sezonojn; la ĉir- kaŭa fako-strio respondas al la sun-orbito kun la dek du zodia- kajn signoj, kaj la ekstera fa- ko-strio al la dudek ok domoj de la luno. La blanka-nigra al- ternado kompareblas al la ŝanĝo de tago kaj nokto, naskiĝo kaj morto.



Araba mezepoka bildo pri ŝaklud-matĉo

La tuta tabul-kvadrato, kiun la hindo nomis aŝtâpada, kun siaj ok-oble-ok fakoj estas topografia "bildigo" de la kosmaj moviĝoj disvolviĝantaj en la tempo; ĝi estas la mondo.

La pecoj moviĝantaj en tiu mond-skemo reprezentas univoke du armeojn; per tio la tabulo fariĝas bataalkampo. Origine temas sendube pri la kosma bataalkampo, kie deva-oj kaj asûra-oj interluktas, la anĝeloj kaj la demonoj. Sed ĉe la araboj, ricevintaj la ŝakludon per la persoj, temis simple pri du armeoj, kiaj konis ilin la mez epoka militarto.

La pecoj kaj la ludmaniero mal multe ŝanĝiĝis post la tempo, kiam Ibn 'Ammâr ludis kontraŭ Alfonso la 6-a. La peco, kiu hodiaŭ reprezentas damon, tiam estis veziro, en la persa fersan, kiu fariĝis en la kastilia ferza, en la provenza fierce kaj fine viêrge (virgulino), tial "damo". La "kurieroj" estis elefantoj en la orienta ludo. Apud la rajdantoj kaj la militaj ĉaroj, la "turoj" reprezentis la pezajn trupojn. Iliaj moviĝoj estis iom pli limititaj ol hodiaŭ. La "peonoj" estas la leĝeraj trupoj, kiuj situis sur la fronto.

Sankta Luizo, reĝo de Francio, malpermesis en la jaro 1254 al siaj regatoj la ŝakludon. Oni kutimis veti monon. Sed Alfonso la Sanga, la deka tiunoma el la reĝoj de Kastilio, verkis en 1283 siajn Libros de Axedrec (Libroj de Ŝakoj), en kiuj li montris, surbaze de arabaj fontoverkoj, la regu-

lojn de la ŝakludo kaj de la parencaj tabulludoj en romanida lingvo. Tie elstaras klare la simboleco de la ŝaktabulo, ĝia signifo kiel skemo de la universo en la tiel nomata "ludo de la kvar sezonoj"; temas pri ludo, en kiu kvar grupoj da pecoj kun la koloroj de la sezonoj, elementaj aŭ fiziologiaj humoroj luktas en rondirado.

La disvastigo de la ŝakludo elde Persio tra la arabaj landoj ĝis Hispanio kaj tra Provenco ĝis Mezeŭropo estas kvazaŭ la spuraro de la kavalira vivmaniero, florinta unue en Persio kaj due en la islama Hispanio. Efektive, la ŝakludo estas kvazaŭ "spegulo de princoj" celita al la tuta militista kasto, tiom al la princo kiel om al la kvaliro, ĉar la ludanto lernas brideti sian pasion; la ŝajne senlima nombro de eblecoj prezentataj antaŭ ĉiu movo -dum li ne troviĝas en ŝakstrato- ne trompu lin pri la fakto, ke iu ajn senerara decido povas ĵeti lin sur devigan vojon kondukantan al ĉiam pli limigitaj agadkampoj; tia estas la leĝo de la agado kaj de la mondo. Sed la libero estas tre intime ligita kun la sciado pri tiu leĝo kaj la saĝo."

Rikardo F. ALBERT REYNA

EKSP0 '92 KAJ LA LINGVOJ DE SIAJ ELDONAĴOJ

Antaŭ unu jaro nia asocio kon--
takis kun la respondeculo pri el--
donaĵoj de la Universala Ekspozici--
cio por pristudi la eblecojn el--
doni esperantilingvan broŝuron
pri la Ekspo '92. Unuamomente li
multe simpatiis al la afero kaj
li eĉ petis nin ektraduki la ofi--
cialan propagandan broŝuron. Ta--
men kiam ni finis ĉi laboron oni
diris al ni ke la Ekspo ne eldo--
nus broŝurojn en Esperanto, nur
en la hispana kaj en la angla.
Ĉiu oficiala registaro rajtus tra--
duki en sian idiomon la broŝuron,
sed kio okazus kun Esperanto kiu
estas oficiala idiomo de neniu
Stato?

Laŭ informo redaktita de sper--
tuloj pri eldonaĵoj la Universala
Ekspozicio devas uzi en siaj el--
donoj la hispanan kaj la anglan,
kelkfoje la francan kaj la germa--
nan, malmulte la italan kaj la
portugalan kaj sporade la araban
kaj la japanan. Tio signifas ke
la anoj de aliaj landoj devos le--
gi la propagandajn broŝurojn pri
Ekspo '92 en unu el tiuj lingvoj.

Ĉi tiu oficiala "lingva ŝpare--
mo" kontrastas kun la pretendo el--
doni far la Ekspo la leteron kiun
sendis Kristoforo Kolumbo al la
Katolikaj Gereĝoj anoncanta la el--
trovon de Nova Mondo. Laŭdire ĉi
letero estas tradukonta en 150
lingvojn, inter ili Esperanto kaj
aliaj kiel la cigana lingvo aŭ la
tutaj lingvoj de la Prakolumbaj
Amerikanoj. Evidente ĉi letero ne
multe propagandos la Universalan
Ekspozicion sed la eltrovon de
Ameriko, afero tute konata de ĉi--
uj homoj.

Malgraŭ ĉi evidenta kialo la
Ekspo preferas eldoni amase ti--
un leteron antaŭ ol eldoni in--
forman broŝuron por eblaj vizi--
tontoj ekz. en la rusa, neder--
landa, franca, sveda... kaj ki--
al ne ankaŭ en Esperanto aŭ en
la cigana lingvo aŭ en la pra--
kolumbaj amerikaj lingvoj.

Ĉi tiu, kune kun aliaj fak--
toj, pruvas la aserton de komi--
siono kiu redaktis informon pri
la eldonado de la Ekspo, kiu di--
ris ke ne ekzistas komunaj de--
cidoj pri ĉi tiu temo, ĉar ĉiu
departemento agadas ĉi-sence laŭ
vole. Tiel laŭ tiu komisiono la
Ekspo elspezis 100 milionojn da
pesetoj en publikaĵoj kies kos--
to estis vere pli malpli 40 mi--
lionoj.

Malgraŭ ĉi komenca neado de
la Ekspo '92 eldoni en Esperan--
to nia asocio decidis antaŭ kel--
kaj minutoj daŭrigi nian petadon
kaj se eble ricevigi amason da
leteroj al la Ekspo de gesami--
deanoj de la tuta mondo por pe--
ti informojn en Esperanto. Por
plenumi ĉi aferon AEU publiki--
gos anoncojn en la plej legataj
Esperanto-revuoj.



LA SENCO DE LA E-KONGRESOJ EN ANDALUZIO

Multfoje oni pritraktis en la Andaluziaj Kongresoj de Esperanto ĉu ni rajtas nomi ĉi kunvenon "kongreso"-n, kaj tiom oni diskutadis ĉi aferon ke oni finfine akordis ŝanĝi la nomon kaj tiel tiu de 1991 jam estos "Andaluzia Renkontiĝo de Geesperantistoj". Sed ĉu tiel grava estas ĉi kvalifikado? Sendube jes! Se ni kunvokas "kongreson" kaj poste ni organizas nek konferencojn, nek prelegojn, nek kulturajn agadojn, kaj la sola esperantista ago estas la Ĝenerala Asembleo de la asocio, ni iamaniere "mensogos" tiujn ĉeestantojn kiuj venis ĉe ni por ĉeesti kongreson. La elreviĝo, do, estos okulfrapa.

Tamen ĉu tio signifas ke oni ne devas organizi verajn kongresojn? Ne tute ne! La kongresoj estas ne nur konvenaj sed ankaŭ necesaj. Tamen estas necese diferencigi ĉiun rolon en la andaluzia E-movado. Tiel nia asocio devas daŭri organizi la nuntempajn kunvenojn de AEU monatoktobre en Torokso pro evidenta kialoj:

- 1) La Ĝenerala Asembleo, eĉ ses aŭ seppersona, estas necesa almenaŭ por pripensi la venontajn agadojn de la asocio. La telefonaj kontaktoj gravas sed ne povas plenumi niajn necesojn pri babilado, diskuto kaj solvo de la problemoj.
- 2) En Torokso, ĉar ni fine trovis tie malmultekostan, mezkomfortan kaj trankvilanejon por renkontiĝi, solvante samtempe la problemojn pri restado, manĝado, ĝuado kaj kunvenado. Solvi ĉi aferojn en alia urbo estus tre malfacile.
- 3) En Oktobro, ĉar la restadejo

en Torokso dum tiu monato ne havas nombrajn gastojn kaj povas oferti al ni ĉiujn servojn.

Post klarigi la neceson renkontiĝi kaj vidi la taŭgecon fari tion en Torokso mi pruvos komprenigi kion signifas "kongresi". Kiel oni jam diris antaŭen kongresi estas ne nur renkontiĝi sed plie, oferi kulturajn kaj sciencajn programojn, kiel ekz. prelegojn pri E-o, konferencojn al ĝenerala publiko, prezenti studojn kaj dosierojn por ĝia diskuto, kaj se eble organizi kulturajn aktojn kiel teatro, filmoj, ktp.

Ĉu ni povas fari tion en Andaluzio? Jes, sed malfacile kaj kun grandaj laboroj. Por tio ne estas necese nur inviti, t.e. pagi vojaĝojn, ĉeeston kaj eĉ stipendiojn, al tiuj kompetentaj personoj kiuj kapablas prezenti eseojn, prelegojn, ktp, sed ankaŭ trovi sufiĉe nombran publikon kaj taŭgan ejon. Kaj ĉi ĉio ne forgesante la pagon al la teatr-grupo, projekciilon de filmoj, ktp. Sendube troa laboro por sensalajraj organizantoj.

Kompreneble ĉi pli granda laboro produktas pli grandan sukceson, ĉar la kongreso altiras plie al la ĝenerala publiko, ĉar ĝi okazas en granda urbo kaj pro la abundo de sciencaj kaj kulturaj programoj. En Andaluzio nuntempe oni organizas renkontiĝojn, sed ne kongresojn. Ne estus malfacile imagi la organizadon de kongresoj kie oni prezentus la internacian ling-

von al la andaluzia socio, tamen multaj aliaj problemoj estas pli urgaj ol ĉi tiu. Sed malgraŭ ĉi malfacilaĵoj ni ne devas forlasi la ideon organizi verajn kongre--

sojn kun abundaj programeroj, ni ne devas forgesi la grandajn kulturajn sukcesojn de Fuenteva queros en Aprilo '89 kaj la kultureman Andaluzian Kongreson en Jerezo '88.

★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★

KURIOZAJ



Ĉi tiu fotografiaĵo aperis la pasintan 28an de Novembro en la kovrilo de la ĵurnalo CORDOBA. Unuavide neniu elstariĝas, ĝi temas pri balotado de la lernejaj konsiloj en iu ajn lernejo de Kordovo. Tamen la esperantista leganto povos rigardi surprize ke en la maldekstr-supra angulo aperas... portreto de Zamenhof! Kion faras ĉi tie D-ro Esperanto?

Nu, ni klarigos: la ĵurnalisto fotografiis la balotadon ĉe la Gimnazio SENECA, antaŭkelkara kerno de la Esperanto-movado en Kordovo. La balotado en tiu gimnazio okazis en la sama klasĉambro kie la grupo de Esperanto instruis la lingvon kaj kie ankoraŭ enestas biblioteketo de Esperanto kaj krome la portreto de Zamenhof, kiu avide kaj rideteme de ziris aperi en la fotografiaĵo.

$$E = mc^2$$

sciencia paĝo

SPACA TELESKOPO "HUBBLE"

Antaŭ kelkaj monatoj la NASA, la usona spac-agenco, lanĉis en la spacon la unuan teleskopon, sia ĉefa celo estis, kiel ĉiuj teleskopoj, trarigardi la spacon, tamen observante el la spaco mem oni evitas la atmosferon kiu malfaciligas la vidadon de la ekstera spaco. La teleskopo ricevis la nomon "Hubble". La lanĉado estis plensukcesa, tamen kiam oni pruvis direktigi la objektivon en la deziratan punkton oni eltrovis ke ekzistis eraro en la lensoj.

Laŭ la NASA ekzistis miso en la konstruo de unu el la lensoj, kies kaŭzo estis informatika eraro en la kalkulo de komputil-programisto, sed ne pro kalkulo kun multnombraj ciferoj, sed por meti signon "+" anstataŭ "-".

Ĉi difekto en la konstruo de la lenso igas ne-uzebla la tutan projekton. La rimedo estos tro malfacila, ĉar ĝi devos esti riparata de alia satelito kiu anstataŭigos la difektitan lenson. Ĉi afero ne estos facile plenumbla malgraŭ la pruvoj por riparado de satelitoj en la sama spaco kiujn oni faris en la lastaj vojaĝoj de la spaca aviadilo.

NOVA SATELITO CIRKAŬ SATURNO

La pasintan 2an de Julio la sciencisto de la NASA Mark Showalter eltrovis novan lunon en la plej lontana ringo de la planedo Saturno. Ĉi satelito mezuras 20 kmojn je diametro, kaj sia ekzisto jam estis antaŭvidata kiam en 11 fotografajoj de la spaca veturilo "Voyager 2" senditaj al la tero en 1981 aperis ne-konata brilanta punkto.

1	B	E	L	G	I	O		K	A	K	T	O
2	A	M		A	Z	E	N	O		L		
3	K	A	R	L	O		E	N	D	I	V	I
4	A	N	Ĝ	E	L	O		C	I	T	R	O
5	N	I		R	E	F	R	E	N	O		M
6	A		A	I	C		O	S	A	R	G	
7	L	A	K	O			M	I	M	O		G
8	O	K	A		A		B	I	I		E	R
9	J	A	P	A	N	I	O		T	E	K	O
10		N	A	J	A	D		N	O	P	O	T
11	A	T	R	O	F	I	O	J		I	F	E
12	N	O	I	C	I	L		O		L	E	S
13	A					L	I	A		I	E	R
14	T	I	E		A	E	R	O		P	I	A
15	O	T	N	O	K		E	D	I	S		
16	M	A	I		S	U	S	U	R	I		I
17	I		Ĝ	U	I		T	R	I	O	D	O
18	O		O	L	O	T	I	T			E	N

Solve de la pasinta krucvortenigmo

NUN NI



***** JUNULARA ALDONAJO AL GAZETO ANDALUZIA *****

★ RENASKIĜAS HEJS.

Aperis nova numero de la revuo HEJS-JUNECO kun la intenco kunordigi la disajn esperantistajn junulojn en la Iberia Duoninsulo. Verdire la hispana E-junulara movado nuntempe stagnas, tamen estas necese agnoski ke ĉi tio ne ŝuldiĝas al la fakto ke ni ne troe laboras, sed male pro ke la juneco ne sufiĉe atentigas la internacian lingvon.

La nova Prezidanto-Kunordiganto de HEJS la gasteiza Iñaki Gaunas lanĉas en la lasta numero de HEJS-JUNECO alvokon por ekigi la laborojn por kunordigi la junularon en Iberio. El Andaluzio ni diras lin ke nia estas je lia tuta dispono por ekigi denove fortan E-junularon en nia Duoninsulo.

★ JUNA SUNO.

La valencia-murcia E-junulara grupo JUNA SUNO organizis tendaron la pasintajn 12-an/14-an de Oktobro en Tuejar (Valencio). La tendaro estis, laŭ informoj, tre gaja kaj aventurema. Ili promesas la organizadon de pliaj tendaroj venontmonate. Indas menciigi ke JUNA SUNO pli-kaj-plie fariĝas fortan E-junular-grupon, ĉefe pro sia laboremo kaj por sia strukturo, kiu respondecigas ĉiujn membrojn por sia funkciado.

★ SEMAJNFINA VIZITO.

Andaluzia Esperanto-Junularo intencas organizi semajnfinan restadon ĉe iu andaluzia urbo dum la unuaj monatoj de la jaro 1991. Ni planas gaje interamikiĝi, diboĉi kaj praktiki Esperanton. Pliaj informoj aperos en venontaj revuoj.

★ IJK EN SVEDIO.

La 47a Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazos de la 20a ĝis la 26a de Julio de 1991 en la sveda urbo Karlskoga. Se vi deziras ĉeesti vi povas kontakti kun ni por faciligi la aliĝadon.

ANDALUZIA ESPERANTO-JUNULARO
Apartado de Correos 611
E-14080 CORDOBA

Krucvortenigmo

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	
1	P	A	R	A	D	I	Z	O		T	E	O	
2	O	N	A	K	I	L	E	P		E	N	E	
3	S	O	Z	E	O		B	R	I	L	A	S	
4	T	R	I			P	R	O		E	M	E	
5	I	M	S	O			O	K		F	O		
6	S	A	M	E	R	T			L	E	Z	O	
7	T	L	O			A	L	K	U	R	I	S	
8	O	A		O	B	S	T	I	N	O		C	
9		J	A	G	U	A	R	O	J		A	I	
10	F		N	I					O	D	E	L	
11	I	G	I	V	O	L	E			E	N	A	
12	L	I	M	O		I	P		O	N	U	T	
13	A	R	A		O	B	I	J		T	E	O	
14	M	A	L	B	L	E	K	J		O	T	R	
15	E	F	E	M	E	R	I	D	O	J		O	
16	N	O		I	T	E		O	Z		E	J	
17	T		I		S	C	I		O	O	G		
18	O	B	U	N		O	R	A	R		C	A	M

Se vi atingas solvi ĉi krucvortenignon sendu al ni fotokopion. Inter la solvantoj ni lotos la libron "LA FAMILIO DE PASCUAL DUARTE" de C.J. Cela. Sendu ĝin al: GAZETO ANDALUZIA - Apartado de Correos 611, 14080 CORDOBA.

HORIZONTALE. -

- 1.- Bela gardeno en kiu vivis Adam kaj Eva antaŭ la peko, Infuzaĵo.
- 2.- Inverse, granda rempieda marbirdo havanta sub la beko grandan poŝon, Interne.
- 3.- Larga vojo konstruita por veturiloj, Kun as-tempa finaĵo, eligi aŭ resendi helan lumon.
- 4.- Numero, Prepozicio montranta motivon de ago, Adverbe, sufikso montranta inklinon al io.
- 5.- Inverse kaj sen la lasta vokalo, Memia elemento, Numero, Prefikso esprimanta abomenon.
- 6.- Inverse kaj kun as-tempa finaĵo, esti movata tien kaj reen per malgrandaj sinkvaj skuetoj, Deviga decido proklamita de plej supera ŝtata aŭtorito.
- 7.- Literoj en "ALTO", Kun is-tempa finaĵo, aliri per movoj pli rapidaj ol marŝo.
- 8.- Du malsimilaj vokaloj, Karaktero de homo firme restanta ĉe sia propra opinio aŭ volo, Konsonanto.
- 9.- Plurale, amerika katparenca besto, Persona pronomo.
- 10.- Konsonanto, Inverse kaj akuzative, persona pronomo, Inverse, felo preparita por industriaĵoj.
- 11.- Inverse, eliri el la organa korpo produktata kaj eligata de la inoj de diversaj klasoj da bestoj, kiu enhavas germon de estonta samspeca besto, Interna.
- 12.- Loko kie finiĝas iu difinita spaco, Inverse, prefikso esprimanta abomenon, Inverse, mezurunuo de pezo.
- 13.- Adjektive, amaso da aĵoj, Inverse, triangula velo kiu troviĝas sur la antaŭa parto de ŝipo, Infuzaĵo.
- 14.- Imperative kaj kun prefikso esprimanta ideon kontraŭan, kriaĵoj, Tri literoj de "Kreto".
- 15.- Plurale, astronomiaj tabeloj sciigantaj la pozicion de planedoj por ĉiu tago de la jaro, Vokalo.
- 16.- Nomo de litero, Tri literoj en "Esti", Inverse, nomo de litero, Inverse, komuna prepozicio kies senco estas nedifinita.
- 17.- Konsonanto, Vokalo, Sen la lasta vokalo, koni certe kaj precize, Inverse, nomo de japana ludo.
- 18.- Inverse, amaso da densaj akvovaporoj pendanta en la supra atmosfero, Inverse, sento de malplezuro al iu.

VERTIKALE. -

- 1.- Funkciulo ĉe publika organizo por transporto de privataj leteroj aŭ malgrandaj paketoj, Tre maldika metalfadeno kiu varmigita de elektro produktas lumon en la lampo.
- 2.- Plurale, nenormalaj, Afrika besto, Konsonanto.
- 3.- Kredo kiu baziĝas je la supereco de iu difinita gento, Adverbe, besto, Kelka persono.
- 4.- Komenca, Inverse kaj mallongigite, internacia lingvo, Akuta angulo formata de du renkontigantaj samaj kurblinioj, Literoj en "Kombi", Konsonanto.
- 5.- Supera ento, Konsonanto, Kava parto en la kapo de homoj per kiu ili sin nutras, Inverse, memlumanta ĉiela astro.
- 6.- Inverse, persona pronomo, Konsonanto, Adjektive, duonsfera trinkvazo kun larga faŭko, Stato de iu aŭ io ne submetita al fremda volo.
- 7.- Ĉevalo en piŝamo, Konsonantoj en "Litro", Havi efektivan rezulton, Inverse, persona pronomo.
- 8.- Inverse, ĉe homoj kaj bestoj, aro de la materiaj partoj, Demanda pronomo por neŭtraĵoj, Japana luktoarto, Vokalo.
- 9.- Vokalo, Korinkline, nomo de virino, Vokalo, Inverse, nomo de la plej bela floro.
- 10.- Elektra veturilo kiu vojaĝas super la tero kaj kiu moviĝas sur kablo, Plurale, elstara osteto en buŝo de homoj kaj bestoj, Inverse, nomo de litero.
- 11.- Eksenti fervoran inklinon por iu, Sen la lasta vokalo, spaco de eleganta danco, Granda.
- 12.- Inverse, mallonga literatura verko, Plurale, aparato por produkti elektromagnetajn oscilojn, Konsonanto.

